

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 199 (2016:3)

Jul - Sep 2016

75-a jarkolekto

Redaktas:

Fernando Pita

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Fabrício Valle, Alberto Fernández-

Calienes Barrios, Djalma Pessata,

Suso Moinhos kaj Túlio Flores


Kovrilo:

Rio Esperantista



Associação Esperantista do Rio de Janeiro


Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefono: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto


 youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro – dezembro / 2010



Enhavo

- El la Redakcio _____ 3
- Nova Heroldo de Esperanto _____ 4
- Orienta Renkontiĝo en Granma, Kubo _ 6
- Rikolto por ĉiuj sezonoj (Recenzo) _____ 7
- 15-a Renkontiĝo de E-G L.L.Z. _____ 9
- Suso Moinhos (Poezia Angulo) _____ 10
- Geografiaj nomoj en Esperanto _____ 11

Ĉiam, kiam mi devas skribi la kutiman antaŭparolon por Rio Esperantista, alfrontas min jena dubo: Ĉu la legantoj aprobos tion, kion oni skribas tie-ĉi? Ĉu ili ja legas nin? Fakte, prepari esperanto-revuon, eĉ “luksan” bultenon tia kia la nia ja estas, estas laciga laboro: oni devas (s)elekti tekstojn, intervjui homojn, recenzi verkojn, traserĉi faktojn kaj precipe novaĵojn pri nia movado, resume, preskaŭ ĉion falas sur ies ŝultrojn, ĉikaze la miajn.

Kaj mi devas diri, se ne estus la magraj kontribuoj de gravaj amikoj, aperantaj ĉinumere, eble tiu ĉi numero de Rio Esperantista ne ekzistus. Kial? Ĉar simpla homo, eĉ se sindediĉa al nia movado, ne povas ĉiam ĉion fari! Do mi ree petegas vin, legantoj de Rio Esperantista, sendu kontribuojn, viajn tekstojn, poemojn, ideojn, pensojn, ktp. Ni ja bezonas aliajn aerojn por vivigi nian revuon.

Kaj kiuj estas tiuj kontribuoj? Vi trovos ĉinumere tekston de Túlio Flôres pri esperantigo de geografiaj nomoj, temo kiu estas unu el la plej debatitaj en la Akademio de Esperanto. Vi ankaŭ tro-



vos artikolon de Fabrício Valle, en kiu la entreprenisto, eksredaktoro de Esperanto (la revuo de UEA) parolas al ni pri siaj projektoj rilataj al la nova eldonado de *Heroldo de Esperanto*. Same vi trovos noticojn, pri la 15-a renkontiĝo de la E-Grupo Lázaro Luís Zamenhof kaj pri la Orienta Renkontiĝo, okazinta en Kubo.

Estos ankaŭ poemo de Suso Moinhos, unu el la plej gravaj el la esperantaj poetoj aperintaj en la Dua Miljaro. Kaj, fine, estos recenzo pri *Vintra Rikolto*, gravega libro ĵus eldonita de Floriano Pessoa, kiun mi (kaj certe ĉiuj) taksos la plej elstara brazila eksperto pri nia kulturo kaj lingvo.

Ĝuu la legadon... kaj sendu kontribuojn!!!

Fernando Pita



Kaj ĉar tiu-ĉi estas Herolda numero de *RE*, jen foto por montri ke mi persone delonge subtenas la gazeton

Heroldo tute renovigita en 2017 bezonos fundan apogon de brazilaj esperantistoj

Fabriceo Valle

Kiam Teo Jung fondis la gazeton *Esperanto Triumfonta* en 1920, li ne povis imagi, ke sojle de la centjariĝo de sia gazeto, alinomita kiel *Heroldo de Esperanto*, brazila sociala entrepreno fariĝos ĝia nova posedanto. Fakte estas, ke *Heroldo de Esperanto* estas unu el la plej renomaj kaj tradiciaj gazetoj en Esperantio. Pri tio neniu dubas, kaj la aĉeto de *Heroldo* estis bona negoco kaj por la nova eldonejo kaj por LF-koop, al kiun ni dankas pro la serioza sinteno dum la dumonata negocumado (aprilo-majo).

Gravas diri, ke la fakto ke nun *Heroldo* estas eldonaĵo de brazila Esperanto-entrepreno havas fundan signifon por la brazila E-movado. Unue, la evoluo kaj de *Heroldo* kaj la entrepreno kiun ĝi eldonas, signifos, ke estos iom da salajraj postenoj por homoj kiuj perfekte regas Esperanton. Krome, estas planata, ekde 2018, eldono de *Heroldo* ankaŭ en la portugala lingvo kaj tio estos mejloŝtono por la movado en la portugallingvaj landoj, ĉefe en Brazilo.

La strategio de Lexus Sociala inkludas partneriĝon kun ĉiuspecaj E-asocioj kaj el tio venos avantaĝaj rezultoj por ambaŭ flankoj.

Nu, neniu dubu, ke Lexus Sociala faros el *Heroldo de Esperanto* la plej modernan kaj avangardan gazeton en Esperanto, sub ĉiuj vidpunktoj. Jen priskribo de la plej kernaj ŝanĝoj:

- **Vasta ĉeftermaro** - la jarkolekto 2017 havos kiel ĉeftemojn: Agado per Esperanto, Agado por Esperanto, Lingvoj, Arto kaj Kulturo, Scienco kaj Teknologio, Ekonomio, Politiko, Junulara Vivo, Edukado kaj Sportoj.
- **Nova aliro** - la devizo *Ni pripensas la mondon* resumas la novan aliron. *Heroldo* 2017 estos malfermita al la mondo kaj ĉiuj aspektoj de Esperanto estos traktataj: lingvo, stilo, formo, esperantista ekonomio, movada politiko, interlingvistiko, esperantologio ktp. Agado per Esperanto estos funde enfazita kaj ĉi-rilate

Lexus estas brazila sociala entrepreno, kies kerna negoco estas la edukado por la propedeŭtika instruado de Esperanto, sed krome ĝi agadas sur la kampoj de la libromarkato kaj reta teknologio.

LEXUS
SOCIALA ENTREPRENO

Heroldo estos engaĝita gazeto, ĉar Sociala Grupo Lexus havas multe da planojn por asisti kaj subteni tian agadon.

- **Baza profesia stabo** - plej multe ni kalkulos pri volontula kunlaboro, sed ni klopodos organizi, ekde la unua numero, profesion stabon, kiu konsistos el redakcia direktoro, redaktoro, redakcia sekretario kaj ĉefprov-leganto.
- **Reta versio** - la reta versio ĉe www.heroldodeesperanto.com estos tre moderna retejo, kun sociretejoj iloj por la legantaro.
- **Reta sistemo de perado** - la tradicio havi landajn perantojn estos forlasita. Heroldo havos nur retajn perantojn, kiuj povos abonigi homojn ie ajn: en sia urbo, regiono, lando kaj tra la tuta mondo. Disponeblos reta abonilo kaj ĉiu reta peranto havos sian labor-paĝon. Entreprenemaj esperantistoj kaj asocioj kaj entreprenoj povos fariĝi perantoj. Por pliaj informoj, bonvolu viziti la retejon <http://bit.ly/retaperado2>.
- **Ligo al sociala entrepreno** - Sociala Grupo Lexus estas sociala entrepreno kaj ĝia prospero signifos ne la riĉiĝon de la fondintoj sed konkretigon de ambiciaj planoj rilate subtenon de projektoj por

aplikado de Esperanto. La video ĉe http://bit.ly/LexusSociala_YT tre resume prezentas la novan eldonejon de Heroldo.

- **Nova grafika projekto** - se paroli pri la papera versio, Heroldo estos simple la plej avangarda gazeto en Esperanto, tiel moderna kaj profesinivela, ke ĝi fariĝos atuto por diskonigo de Esperanto en la neesperantista medio;



La nova marko kiu identigos la versiojn de *Heroldo de Esperanto*.

- **Vasta kunlaborantaro** - la nombro de kunlaborantoj estos vere granda. La sukceso de Heroldo fakte ĝisfunde dependos de fideleco kaj kunlaboremo de talentaj kaj verkemaj esperantistoj al la ambicia plano de Lexus Sociala por Heroldo. Interalie, estas planata eldono de Heroldo en naciaj lingvoj ekde la jaro 2018, kiel anoncite supre. Formi grandan skipon de kunlaborantoj en Brazilo tre gravos por Heroldo, ĉu en en Esperanto, ĉu rilate la ideon de Heroldo en la portugala lingvo.

Du belaj novaĵoj, rilate la paperan formon: ĝi havos 20-paĝojn kaj el tiuj ok estos dediĉitaj al du 4-paĝaj kajeroj nome *Spegulo*, kajero pri la ĉeftemo “Arto kaj Kulturo”, kaj *Lingvio*, kajero pri la ĉeftemo “Lingvoj”.

Nu, iom post iom Heroldo certe allogos la esperantistojn el ĉiuj grupoj kaj asocioj, ĉiuj Esperanto-tendencoj, ĉiuj koloroj kaj kredoj. Baza principo de Heroldo estos nediskriminacio kaj valorigo de la sendependa pensado. Heroldo havos lokon por ĉiuj, kiuj volas serioze pripensi la mondon kaj kadre de ĝi prinpesi ankaŭ la rolon de la esperantisto en la mondo.

Aboni Heroldon eblos per la reta abonilo ĉe

www.heroldodeesperanto.com
aŭ ĉe unu el la retaj perantoj, en paĝo tia:

www.heroldodeesperanto.com/nomodelaperanto

Fakto estas, resume, ke la mondo ĝisfunde ŝanĝiĝis ekde la jaro 1920 kaj se Teo Jung ne povis antaŭvidi la destinon de sia gazeto, same ni ne povas antaŭvidi kia estos la mondo, ne post 100 jaroj, sed post nur 10 jaroj. Tio estas tre ekscita aspekto por ni, kiu prenos la redaktadon de Heroldo de Esperanto ekde la unua numero de la jarkolekto 2017.

Ni kalkulas pri la brazilaj esperantistoj!

Raporto Orienta Renkontiĝo en Granma, Kubo

Alberto Fernández-Calienes Barrios

De la 22-a ĝis la 25-a de septembro okazis, ĉirkaŭ belega naturo rande de Ĉenmontaro Maestra, en la Kampadejo Salto de Jibacoa (Manzanillo, Granma) **Esperanto-Renkontiĝo de la Orienta Regiono** kun partopreno de 45 esperantistoj venintaj el kvin kubaj provincoj (Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Villa Clara kaj Havano). Tie, malgraŭ manko de kelkaj tradiciaj programeroj, kaj troa vespera abunda pluvego, la organizantoj ja zorgis pri enhave suka evento.

Gonzalo Collantes García (Santiago de Cuba), Prezidanto de la Kuba Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), respondecis pri la instruista trejnado. Gonzalo provis ilin per abunda materialo rilate didaktikon kaj metodikon kaj 11 el ili sukcese trapasis la instruistan ekzamenon. Javier Ramos Nistal (Havano) kune kun Gonzalo Collantes García, gvidis kurson por komencantoj, en kiu ne mankis amuziĝo. D-ro Wilfredo Díaz Hernández (Granma), prezidi-

danto de la Klubo Martí-Zamenhof pelegis pri la idearo de Martí kaj la humanismo de Zamenhof. Alberto Fernández-Calienes Barrios (Prezidanto de KEA, Havano) prezentis la diskuttemon “Esperanto, fenestro al la mondo. Kion fari post la kurso?” surbaze de personaj spertoj.

Aparte interesa estis “Interŝanĝo kun la prezidanto de KEA”, kiu komenciĝis tuj post la vespermanĝo kaj finiĝis noktomeze pro la multaj demandoj, opinioj kaj kolektiva deziro plibonigi nian agadon.

Antaŭ nia alveno en Granma ni estis informitaj pri la bona rezulto en la inspekto de la Ministrejo pri Justico al la Provinca Filio. Ni havis ankaŭ inviton partopreni kunsidon de la loka Estraro kun reprezentantoj de tiu ministrejo kaj de la Provinca Direkcio pri Kulturo, kiu okazis la 22-an antaŭtagmeze. Tie ni havis okazon aŭskulti de la lokaj aŭtoritatoj laŭdon

al la plurjara laboro de nia provinca filio kaj kune kun ili, ni insistis pri la bezono havi moralan subtenon por pli efike plenumi nian laboron. Ni estas certaj, ke tiu kunsido signos novan etapon por Esperanto en Granma.



Koran dankon al la estraranoj de la Provinca Filio de Kuba Esperanto-Asocio en Granma: Frank Michel Cedeño Estrada, Anyer Montero Ramos, Yainier Rodríguez Fonseca kaj Rafael Cabrera Espinosa, Komisiito de la Nacia Komitato de KEA por la Orienta Regiono.

Rikolto por ĉiuj sezonoj

Recenzo

Fernando Pita

Ni ankoraŭ estas en Septembro, kaj ĉiuj ni povas ja konkludi ke jaro 2016 montriĝas kiel unu el la plej teruraj el nia tuta historio: abundas homaj kaj ekologiaj tragedioj, svarmas politikaj problemoj en ĉiuj kontinentoj, kaj oni ne vidas tujan solvon.

En la esperanta kampo, aliaj tragedioj okazas: inter aliaj, la subitaj forpasoj de tri el la plej elstaraj esperantologoj de nia tempo: Paul Gubbins, Michel Duc Goninaz kaj Reinhard Haupenthal. Fulma perdo de tiuj tri homoj similas kvazaŭ tuta biblioteko vorata

de nesatigebla fajro.

Ĝuste pro tio, oni ja devas saluti la *Vintran Rikolton* de Floriano Pessoa. En tiu 300-paĝa libro, oni elaçetas, prezervas kaj savas diversajn tekstojn kiuj reflektas kaj reliefigas la gravecon kaj kompetentecon de la aŭtoro. Ĉar Floriano Pessoa, ĉiuj scias, estas unu el niaj plej atentvekaj veteranaj esperantistoj. Homo kiu jam de jardekoj donacas al nia movado siajn intelektajn fortojn; ĉu per verkado de artikoloj, ĉu per prezentado de prelegoj, ĉu per simplaj babildoj (kiuj estis, laŭ la ĉeestintoj, veraj konferencoj!); fakto estas, ke Floriano estas eble la nura brazilano kiun oni povas sentroige kompari al la menciitaj forpasintoj.


Tamen, kontraŭe al tiuj, kiuj malfeliĉe lasis al aliuloj la taskon (s)elekti la plej gravajn erojn de iliaj verkoj; nia kara Floriano mem rikoltis, en ties larĝega verkaro tion, kio povos utili al novaj - kaj ankaŭ al tiuj ne tiom novaj - esperantistoj dum ilia plilernado de la lingvo. La artikoloj mem kiuj formas la libron estas kvazaŭ vinĉarto de luksa restoracio: estas

elektoj por ĉies gustoj! Ĉar ne estas esperantrilata temo netuŝita de Floriano: historio, etimologio, gramatiko, literaturo, tradukoj, originala literaturo, recenzoj, ktp. Ĉar la grundo estas riĉa kaj fruktodona, ĉio estas en lia, ja ĉiusezona, rikolto.

Tre interesa en la libro estas la resumprezenta teksto kiu, en la portugala, antaŭas, ĉiujn artikolojn, kaj kiu tre faciligas al ni elekti kion ni legos, ĉar tiu *Vintra Rikolto* devas, kiel ĉiu bona vino, modere konsumita. Alia grava punkto estas ke ĉiu artikolo finiĝas per ^{bibliografio} kiu indikas al tiuj kiuj iom pli dezirus scii pri la temo, la sekvotan vojon. Fakte, oni eĉ ne perceptas mankadon de referencoj pri antaŭaj publikigoj de diversaj el la tekstoj – al interesitoj eble interesus kompari ĉu estis ŝanĝoj en ili.

Tre pozitiva en la libro estas la tre belaspekta kovrilo preparita de Pamela Aragón. Kongrua al la titolo, ĝi tuj vekas nian scivolemon kaj intereson pri ĝia enhavo.

Tamen, mi ne povus ne rimarkigi mankon de ISBN-numero, fakto kiu malebligas, ekzemple, ke la libro estu donacita al lokaj aŭ universitataj bibliotekoj. Tio, karaj legantoj, estas afero ja pripensenda de nia movado.



Vintra Rikolto,
Floriano Pessoa,
memeldono, 300p.

Djalma Pessata

Dum ok jaroj mi ne partoprenis en esperantaj renkontiĝoj. La zorgo pri la evento, la sopiro kaj la emocia renkonto kun karaj geamikoj estis tia, ke miaj manoj tremis, mi transpiris kaj plurfoje ekploris. La fratecaj interrilatoj estis tiom intensaj, ke nia humila eventejo ŝajnis trioblige la preskaŭ 50 partoprenintojn en la domo 46 de la strato Sapopemba (Bento Ribeiro, Rio de Janeiro, Brazilo), en la 11-a de septembro 2016.

Jailton Pinheiro malfermis la eventon legante belan mesaĝon kaj omaĝante la memoron de Altivo Pamphiro, nobla animo, kiu apogis Esperanton kaj subtenis la aktivecojn de nia grupo dum multaj jaroj. Tiu emocia malfermo kortuŝis la publikon, kiu pasie kantis la himnon de Esperanto, “La Espero”.

Delonge mi volis inviti la gravan esperantiston Fernando Maia prelegi en nia evento. Finfine la oportuno alvenis. La subtila temo (la portugala esprimo *Esperanto dá liga*, tradukebla kiel “Esperanto funkcias”) kaj la sperto de la preleginto estis perfekta miksaĵo, unu el la plej grandaj sukcesoj de la tridekdu-jara historio de nia grupo. Fernando, inteligenta, sentis la fratecan etoson de la samideanaro kaj proponis al ĉiuj individuan sinprezenton, kio instigis la interrilatojn dum la evento. Poste, la preleginto didaktike

kaj pasie resumis la historion de Esperanto (kaj de Zamenhof), ebligante al komencantoj akiri la konvinkon pri la graveco de la lingvo. Fernando Maia finis sian prelegon pere de alia resume pri kiel Esperanto influis kaj influas en lia vivo, liaj vojaĝoj tra Brazilo, Ĉinio, Sud-Koreio, Azerbajĝano ktp. Nia juna preleginto pruvis, ke Esperanto produktas kulturon kiel ajna lingvo. Li meritas la omaĝon, kiun ni faris al li, per aŭdovidan prezentadon bazita sur la originala esperanta poezio “Milde”, verkita de li mem.

Sekve, Jorge Araújo emociis ĉiujn, kiam eniris tien kiel Zamenhof. Li deklamis pecojn de la parolado de nia majstro en la 8-a Universala Kongreso de Esperanto, en Krakovo, 1912. La teksto de Zamenhof, la interpretado de Jorge, la bela muzika fono kaj la vidprezentado aperigis larmojn en la okuloj de kelkaj personoj.

Daŭrigo en la paĝo 18.



Fernando Maia prelegas

Jen por vi poemo kies temo niajn veteranojn certe memorigos pri komuna anonco en niaj revuoj. Pri sia aŭtoro kaj lia debuta libro “Laminarioj”, (aĉetebla ĉe UEA), vi legos en venonta numero, atente atendu...

Korespondi deziras

Ankoraŭ juna fraŭlo, maŝinteknika inĝeniero,
deziras korespondi pri diversaj temoj

kun aliaj kolegoj, internaciaj amikoj, samhobiuloj.

Pri konvolvuloj, volvotigoj, botaniko,

komputeroj.

Interesiĝas pri geofiziko, sportpraktiko, beletristiko

(poezia prozo, teatra eseo,

analektoj de konfuceo),

ansbredado, ananaskultivado, nacimalplimulto,

alternativaj kuracmetodoj.

Serĉas interŝanĝon de afrankitaj bildkartoĵoj,

stampitaj poŝtmarkoj, unuataĝaj kovertoĵoj,

aliaj filatelaĵoj.

Serĉas.

Alumetetikadoj, kalendaretoj, glumarkoj, maĉgumoj,

mapoj, salutkartoĵoj, fotografaĵoj, akvareloj,

unuopaj kolorpozitivaj pri arto,

ajna laboro en Eŭropo

estas bonvenaj.

Deziras insignojn ricevi uŝuo, karateo, ŝako,

sendi bildojn de sunsubiroj.

Deziras vojaĝi en turismaj grupoj, folklorensembloj,

nur pretekste.

Deziras kaŝiĝon en via hejmo eble por tri semajnoj.

Deziras fuĝi.

Ĉu Belinsulo aŭ Iljabelo? – Ĉu Amazonia aŭ Amazona?

Túlio Flores

La du gravaj Esperanto-renkontiĝoj okazintaj en Brazilo en la lastaj monatoj – la Brazila Kongreso de Esperanto (en *Manaus*, AM) kaj la Esperanto-kongreso de São Paulo (en *Ilhabela*, SP) denove starigis antaŭ mi la gravan demandon pri la esperantigo de la brazilaj geografiaj nomoj.

Antaŭ kelkaj jaroj mi faris studon pri tiu temo, kaj sendis la rezulton al kelkaj esperantistoj brazilaj kaj eksterbrazilaj. La plenan laboraĵon ĉiu povas elŝuti en la adreso:

<http://esperanto-mg.com.br/arquivos/esperantigo-tulioflores.pdf>

Nun sekvas kelkaj principoj, kiuj gvidis min dum la laboro.

La principoj - Brazilo estas dividita en 26 ŝtatoj (aŭ federaciaj unuoj) kaj unu federacia distrikto (kie situas la ĉefurbo Braziljo), kaj havas 5.570 municipojn. En ĉi tiu laboraĵo mi montras la kriteriojn, kiujn mi deduktis por la esperantigo de tiuj ŝtataj urbo-nomoj.

La unuan provon sisteme esperantigi la brazilajn geografiajn nomojn supozeble faris s-ro Délio Pereira de Souza per la verketo *Brazilaj Geografiaj Nomoj*, eldonita en 1980. Tie li montras la esperantigon de la nomoj de kelkaj urboj, riveroj, montoj k.a., sed

la nurajn kriteriojn, kiujn li eksplicite mencias estas la aldono de *-o* al oksitonaj nomoj kaj ŝanĝo de la vortfiniĝoj al *-o* en la neoksitonaj. Pri la ceteraj partoj de la nomoj oni povas nur konjekti, kiun sistemon li uzis, ĉar ili ne estis konsekvence esperantigitaj.

Demando, kiun eble oni povas fari pri la temo estas: ĉu fakte oni bezonas esperantigi ĉiujn urbonomojn, eĉ tiujn de malgrandaj, internacie nekonataj urbetoj? Mia emfaza respondo estas: *Jes!* Ne gvidis min la fakto, ke la urbo estas granda aŭ malgranda, grava aŭ malgrava, signifa aŭ sensignifa. Laŭ mi, ĉiuj urboj estas gravaj kaj plensignifaj, sendepende de tio, ke en tiu aŭ tiu alia loĝas milionoj aŭ kelkmilo da homoj. Gravas, en ĉi tiu laboro, trovi la regulojn por la esperantigo. Tiel ni havos klare difinitajn kriteriojn por esperantigi ĉiujn aliajn nomojn necesajn por la brazila esperantistaro, kaj eble ankaŭ por aliaj landoj. Ĉar la laboro estas tro granda, ol ke mi povus fari ĝin je unu fojo, mi limigis mian kampon al la nomoj de la ŝtatoj kaj municipoj de Brazilo. Se ĉi tiu laboraĵo ricevos la aprobon de la brazila esperantistaro, oni povas apliki ĝin al la ceteraj geografiaĵoj (biomoj, riveroj, riveretoj, lagoj, montoj, kvartaloj ktp.). Ankaŭ la ĝe-

neralaj vortoj de la brazila kulturo, historio, folkloro ktp. povos profiti el ĝi. Sed la esperantigo de ĉi tiuj ĝeneralaj vortoj estas iom pli komplika ol la simpla transskribado, kiel okazas ĉe la urbonomoj. Tial mi lasos ĉi tiun laboron por posta etapo.

La plej ĝenerala sistemo por esperantigi fremdajn nomojn estas la 15a regulo de la Fundamenta Gramatiko. Ĝi tekstas: “La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de ĉi tiu lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.” (El *Fundamenta Krestomatio*, 18 eld, p. 241).

Por apliki ĉi tiun regulon, estas necese scii, kiel la diversaj lingvoj nomas la brazilajn urbojn. Eble la plej internacie konata brazila urbo estas *Rio de Janeiro*. Se ni esploros, kiel la diversaj lingvoj de la mondo traktas tiun nomon, ni vidos, ekzemple en la diverslingvaj versioj de Vikipedio – <http://eo.wikipedia.org/> –, ke preskaŭ ĉiuj lingvoj, kiuj uzas la latinan alfabeton uzas la nomon senŝanĝe, sed prononcas ĝin laŭ siaj apartaj prononcaj reguloj. Inter tiuj lingvoj, aparte

interesaj por mia celo estas la lingvoj litova kaj latva, ĉar, kvankam ili uzas la latinan alfabeton, ili regule skribas la fremdajn nomojn laŭ la ortografio de ĉi tiuj lingvoj. En la litova ĝi estas **Rio de Žaneiras** kaj en la latva – **Riodežaneiro**. Alia lingvo, kiu estas utila en tiu esplorado estas la rusa, ĉar ĝi uzas alian alfabeton (la cirilan) kaj tial ĝi devas ĉiujn fremdajn nomojn skribi per ĉi tiu alfabeto. La citita urbonomo, en la rusa lingvo, estas skribata **Рио-де-Жанейро**. Krome, konsultante la rusan Vikipedion, mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj brazilaj urboj jam havas siajn nomojn skribitajn per la cirila alfabeto.

La esperantigo de propraj nomoj povas baziĝi sur tri sistemoj: la grafisma, la fonetisma kaj la semantika. En la grafisma sistemo, oni konservas laŭeble la samajn literojn de la origina nomo, sed prononcas ilin laŭ la Esperanta maniero. La nomo de la ŝtato Ceará, ekzemple, fariĝus *Ceará* [tsea'ra]. En la fonetisma sistemo, oni provas prezenti la prononcon de la nomo uzante la Esperantan alfabeton. La sama ŝtatonomo fariĝus *Seará* [sea'ra]. En la semantika sistemo, oni tradukas la nomon al ekvivalenta Esperanta nomo. La sama ŝtatonomo fariĝus, laŭ unu el la versioj, *Kanto de la araeto* (el indiĝena vorto *cemo* (forte kanti) kaj *ara* (malgranda arao) (Fonto: <http://pt.wikipedia.org> - arti-

kolo Ceará). En ĉi tiu laboraĵo mi baziĝis ĉefe sur la fonetisma sistemo, kun ioma rigardo al la grafisma, kaj, en maloftaj okazoj, al la semantika.

Do la baza principo, kiun mi sekvis en ĉi tiu laboraĵo estas la *prononco* de la nomoj kaj ĝia laŭebla prezento per la Esperanta alfabeto, kun uzo de la substantiva finaĵo *o*. Tamen, por prezenti brazilan nomon per la Esperanta alfabeto, mi devis el ĉiu aparta nomo dedukti la kriteriojn, kiujn mi uzos, kaj kiuj taŭgos por ĉiu alia simila nomo, tiel ke ĝi povos esti uzata en ĉiuj estontaj okazoj, se oni nur sekvos la kriteriojn.

Por dedukti tiujn kriteriojn, mi elektis, el la 5.570 municipoj de Brazilo, tiujn 1.000 municipojn, kiuj estas pli gravaj, ĉu pro la nombro de loĝantoj, ĉu pro ilia proksimeco al iu el la grandaj urboj.

Nun mi klarigu pli detale mian labormetodon: Kiel menciite, mi elektis 1.000 municipojn por komenci la laboron. Ĉiujn tiujn nomojn mi laŭlegis kaj provis skribi ilin per la Esperanta alfabeto. Tiel mi deduktis la kriteriojn, kiujn mi nun prezentas al vi.

Alia afero, kiu gvidis min estis la klopodo ne ŝanĝi la akcentan silabon de la nomoj. Tio estas facile farebla rilate la oksitonajn kaj paroksitonajn nomojn. La unuaj solviĝas per aldono de la substantiva finaĵo *-o* (ekz.: Ba-

rueri – *Baruerio*); la duaj, per la anstataŭigo de la fina vokalo (aŭ silaboparto) per *-o* (ekz.: Fortaleza – *Fortaleza*; Alfenas – *Alfeno*). Sed la paroksitonajn nomojn mi devis ŝanĝi al paroksitonaj (ekz.: Alcântara – *Alkantaro*), pro la paroksitoneco de Esperanto.

En la sekvo mi komentos kelkajn punktojn, kiujn mi frontis dum la esplorado.

Uzo de streketoj ĉe plurelementaj nomoj – Multaj el la nomoj havas pli ol unu vorton (ekzemple: Rio de Janeiro, São Paulo, São Bernardo do Campo, Cachoeiro de Itapemirim). Kompreneble oni ne povas uzi tiujn vortojn aparte, ĉar tiel ili ne formus taŭgajn nomojn por la derivado de adjektivoj kaj loĝantonomoj. Tamen, se oni skribus ilin en unu sola vorto, ili riskus fariĝi preskaŭ nedeĉifreblaj. Tial mi preferis uzi dividstreketojn inter ĉiuj elementoj de la nomoj: *Rio-de-Janeiro*, *San-Paŭlo*, *San-Bernardo-do-Kampo*, *Kaŝoejro-de-Itapemirino*.

Unu loko, pluraj nomoj – Ofte okazas, ke urbo havas unu oficialan, plurelementan nomon, kiu estas uzata en dokumentoj, poŝtaĵoj k.tp., kaj alian pli malgrandan nomon, kiu estas uzata de la loĝantoj en la ĉiutaga vivo aŭ en neformalaj okazoj. Ekzemple, la urbo São João del-Rei (*San-Ĵoan-del-Rejo*) estas neformale nomata de siaj loĝantoj nur São João (*San-Ĵoano*),

En tiuj okazoj, kiam mi scias, ke mallonga formo estas uzata, mi esperantigis ambaŭ formojn. Alia konata ekzemplo estas Rio de Janeiro (*Rio-de-Ĵaneiro*), kiun la loĝantoj – kaj ne nur ili! – ofte nomas nur Rio (*Rio*). En aliaj okazoj, kelkaj urboj havas ankaŭ t.n. *karesan* nomon, kiu estas simpligita formo de la oficiala nomo. Ekzemple, la urbo São Paulo (*San-Paŭlo*) estas nomata ankaŭ Sampa (*Sampo*). Kaj Florianópolis (*Floriano*) estas nomata Floripa (*Floripo*).

Urbonomojn oni ne traduku, sed asimilu – Kion signifas la vortoj *Parizo*, *Londono* kaj *Moskvo*? Trovi ilian signifon estas tre malfacile, se entute eble. La samo okazas rilate la brazilajn urbonomojn (kaj ankaŭ la ŝtatonomojn). La signifo de la nomo de la fama urbo Rio de Janeiro estas *Rivero de Januaro*, sed la fakto, ke ĝi estas facile tradukebla ne signifas, ke oni traduku ĝin. Oni simple adaptu ĝin al la Esperanta ortografio (laŭ la 15a regulo de la Fundamento). Same erare estus esperantigi la ŝtatonomojn São Paulo kaj Santa Catarina per *Sankta Paŭlo* aŭ *Sankta Katarino* aŭ la urbonomon Belo Horizonte per *Bela Horizonte*. Tiujn nomojn oni devas adapti laŭ la prononco kaj tial ili fariĝas *Rio-de-Ĵaneiro*, *San-Paŭlo*, *Santa-Katarino* kaj *Belo-Horizonto* (pri ĉi tiu lasta legu iom sube pri la

uzo de la litero *h*).

Komprenoble tio ne signifas, ke en iu okazo oni ne klarigu la signifon de iu nomo, se oni konas ĝin. Ekzemple, la urbonomo Taguatinga povas havi la signifon “blanka birdo”, sed por esperantigi la nomon, oni prefere uzu *Tagvatingo*, el kiu oni povas havi la adjektivon *tagvatinga* kaj la loĝantonomon *tagvatingano*.

Rilate la literon “h” – En la portugala lingvo la litero *h* ne estas prononcata. Tial en la komenco de mia esplorado mi ordinare ignoris ĝin en la transskribado de la nomoj. La urbonomo Belo Horizonte, ekzemple, devus esti transskribata *Belo-Orizonto*, same kiel faras la lingvoj rusa (**Белу-Оризонти** – Belu-Orizonti) kaj la latva (Belu Orizonti). Tamen en la ŝtato Suda Rio-Grando (aŭ Rio-Grande-do-Sulo), pro influo de la germanaj enmigrintoj, almenaŭ unu urbo (Nova Hartz) havas nomon, en kiu la *h* estas prononcata. Diskutinte la temon kun kelkaj brazilaj esperantistoj, mi venis al la konkludo, ke en la okazoj, en kiuj la litero *h* estas la unua litero de la vorto, estas preferinde restigi ĝin, farante kompromison kun la grafisma sistemo. Sekve urbonomoj kiel Belo Horizonte, Novo Hamburgo, Hortolândia fariĝis *Belo-Horizonto*, *Novo-Hamburgo*, *Hortolando*.

Pri unu punkto tamen, mi konservas mian opinion, ke oni ne transkribu la h: temas, kiam ĝi estas ene de la vorto kaj havas neniam prononcan motivaĵon ekzisti. Pro tiu motivo nomoj kiel Bahia kaj Piumhi fariĝis *Baio* kaj *Piumio*. Eĉ en la portugala lingvo tiu h ne estas pravigebla kaj oni devus skribi Baía (same kiel en la loĝantonomo baiano) kaj Piuí (en la ĉi-lasta la u havas nazalan sonon [piũ], same kiel en la vorto muito).

La silaboj gua, gue (= güe), gui (= güi), guo, qua, que (= qüe), qui (= qüi), quo – Sekvante la Esperantan tradicion, mi transskribas tiujn silabojn al *gva, gve, gvi, gvo, kva, kve, kvi, kvo*. Interese, ke en la rusaj transskriboj mi trovis **гва, гуи, ква** anstataŭ la atendataj **гва, гви, ква**. Ekzemple: Guarapari (*Gvarapario, Гуарапари*), Birigui (=güi) (*Birigvio, Биригуй*), Itaquaquecetuba (*Itakvakesetubo, Итакуакесетуба*).

La diftongo “ou” – Kvankam kelkaj esperantistoj opinias, ke la silabo “ou” ne estas propre Esperanta, mi tamen uzis ĝin, ĉar mi vidas nenian problemon en ĝia uzado por transskribi fremdajn nomojn, kiaj estas tiuj geografiaĵoj. Mi eĉ kredas, ke tio riĉigas la Esperantan sonaron, same kiel estus la uzado de “*güa*”, “*küa*” kaj similaj.

Sekvi la prononcon, sed ĝis certaj

limoj – Uzado de la fonetisma sistemo por esperantigi la nomojn, ne signifas, ke oni blinde sekvu ĝin. En granda parto de Brazilo la silaboj de kaj di, te kaj ti estas en kelkaj vortoj pronocataj respektive *ĝi* kaj *ĉi* (aŭ eĉ *ĝ* kaj *ĉ*!): tarde [*tárĝi*, aŭ *tarĝ*], dia [*ĝia*], leite [*lejĉi* aŭ *lejĉ*]. Io simila okazas al la senakcenta vokalo o, kiu estas kelkfoje pronocata *u*: pato [*patu*]. En tiuj okazoj mi preferis konservi la originajn literojn, por ke la vorto ne tro diferencu de la origina grafio. Des pli, ke multaj brazilanoj ja pronocas tiujn sonojn same kiel en Esperanto.

Aliflanke, la esperantigita nomo ne havu sonojn neekzistantajn en la brazila prononco. Tial la silabojn ce kaj ci mi transskribas al *se* kaj *si*, ĉar la Esperanta sono *c* [ts] ne apartenas al la brazila sonaro, krom en fremdaj vortoj kiel *pizza, best seller*. Sekve, nomoj kiel Recife kaj Ceará fariĝas *Resifo* kaj *Searao*. Simile pri la sono *h*, kiun kelkaj volas atribui al la komenca *r* aŭ al la duobla *rr*. Ili estas malsamaj sonoj. Ambaŭ *r* kaj *rr* mi transskribas per nura *r*: Serra – *Sero*, Rio – *Rio*.

La antaŭaj transskriboj – Ĉar ĝis hodiaŭ ne ekzistis difinita kaj klare formulita sistemo por esperantigi la brazilajn nomojn, dum la pasintaj jaroj amasiĝis la plej diversaj versioj de tiuj nomoj. Ekzemple, por la nomo

Rio de Janeiro, oni trovas almenaŭ naŭ versiojn: *Rio-de-Ĵanejro*, *Rio-deĵanejro*, *Rio de Ĵanejro*, *Rio-Ĵanero*, *Rioĵanero*, *Rio-Ĵanejro*, *Rio-de-Janejro*, *Riodejanejro*, *Rio de Janeiro* (A. Cherpillod, *Nepivaj vortoj*, 2 eld, pĝ. 4). Eble en la komenco oni hezitos antaŭ la novaj nomoj ĉi tie proponataj por aliaj geografiaĵoj, sed oni bonvolu rigardi ilin, kiel provojn por klare difini la kriteriojn por esperantigo de la brazilaj nomoj. Jen kelkaj el tiuj proponoj:

Ŝtatoj: Acre – *Akro*, Alagoas – *Alagoo*, Amazonas – *Amazono*, Bahia – *Baio*, Ceará – *Searao*, Espírito Santo – *Espirito-Santo*, Maranhão – *Maranjano*, Minas Gerais (aŭ Minas) – *Minas-Ĵerajso* (aŭ *Mino*), Rio de Janeiro – *Rio-de-Ĵanejro*, Rondônia – *Rondonjo*, Roraima – *Rorajmo*, Santa Catarina – *Santa-Katarino*, São Paulo – *San-Paŭlo*, Sergipe – *Serĵipo*, Tocantins – *Tokantinsio*.

Ŝtataj Ĉefurboj: Aracaju – *Araĵajo*, Belém – *Beleno*, Belo Horizonte – *Belo-Horizonto*, Boa Vista – *Boa-Visto*, Campo Grande – *Kampo-Grando*, Cuiabá – *Kujabao*, Florianópolis – *Florianopolo*, Goiânia – *Gojanjo*, João Pessoa – *Ĵoan-Pesoo*, Maceió – *Masejoo*, Manaus – *Manauŝo*, Palmas – *Palmo*, Porto Alegre – *Porto-Alegro*, Porto Velho – *Porto-Veljo*, Recife – *Resifo*, Rio-Branco – *Rio-Branko*, Rio de Janeiro (aŭ Rio)

– *Rio-de-Ĵanejro* (aŭ *Rio*), São Luís – *San-Luiso*, São Paulo – *San-Paŭlo*, Teresina – *Terezino*, Vitória – *Vitorjo*.

Aliaj Urboj: Alto Paraíso de Goiás (aŭ Alto Paraíso) – *Alto-Paraizo-de-Gojaso* (aŭ *Alto-Paraizo*), Aragarças – *Aragarso*, Barbacena – *Barbaseno*, Barra do Garças – *Bara-do-Garso*, Barra Mansa – *Bara-Manso*, Barretos – *Bareto*, Bauru – *Baŭruo*, Betim – *Betino*, Campina Grande – *Kampina-Grando*, Campinas – *Kampino*, Cascavel – *Kaskavelo*, Chapecó – *Ŝapekoo*, Contagem – *Kontaĵo*, Divinópolis – *Divinopolo*, Ilhabela – *Iljabelo*, Duque de Caxias – *Duke-de-Kaŝio*, Governador Valadares – *Governador-Valadaro*, Juiz de Fora – *Ĵuiz-de-Foro*, Lavras – *Lavro*, Montes Claros – *Montes-Klaro*, Niterói – *Niterojo*, Ouro Preto – *Oŭro-Preto*, Pelotas – *Peloto*, Petrópolis – *Petropolo*, Piracicaba – *Pirasikabo*, Poços de Caldas (aŭ Poços) – *Posos-de-Kaldo* (aŭ *Poso*), Pouso Alegre – *Pouĵo-Alegro*, Ribeirão Preto – *Ribeĵran-Preto*, Santos – *Santo*, São Vicente – *San-Visento*, Sete Lagoas – *Sete-Lagoo*, Três Rios – *Tres-Rio*.

Provu la novajn nomojn – Se vi volas aŭdi la proponatajn nomojn kaj certigi, ĉu ili estas bone kompreneblaj se dirataj de neportugallingvano, vi povas uzi la programon Guglo-tradukilo – <http://translate.google.com> – kaj skribi en la maldekstra kadro la esperantigi-

tan nomon. Elektinte la lingvon Esperanto klaku sur la butonon de la laŭtparolilo por aŭdi la prononcon. Vi konstatos, malgraŭ la robota voĉo de la programo, ke ĝi estas tre facile komprenebla de kiu ajn brazilano, krom eble pro la akcento. Se vi elektos la portugalan lingvon en la dekstra kadro, vi povos kompari ambaŭ prononcojn klakante sur la laŭtparolilon de la dekstra kadro.

Ĉu San-Paŭlo kaj Rio-de-Ĵanejro? – En Brazilo la nomoj São Paulo kaj Rio de Janeiro estas uzataj kaj por la urboj kaj por la ŝtatoj. Mi ne vidas motivaĵon, kial ili havu malsamajn nomojn en Esperanto. Des pli, ke ekzistas krome futbalteamo, kies nomo ankaŭ estas São Paulo. En Belo-Horizonto ekzistas kvartalo, kies nomo estas São Paulo: kiel nomi ĝin? Ĉu pro tio en Esperanto ĝi havus alian nomon, ekzemple San-Paŭlteamo? Kiam necese, oni aldonu la informojn *ŝtato San-Paŭlo* kaj *urbo San-Paŭlo*, *kvartalo San-Paŭlo*. Por la adjektivoj de tiuj nomoj tamen ni havas la formojn paulista (por la ŝtato San-Paŭlo), paulistano (por la urbo San-Paŭlo) kaj são-paulino (por la futbala teamo). En Esperanto ni povus uzi por la tri *san-paŭla*. Por la respondanta substantivo, ankaŭ taŭgus *san-paŭlano*, kiun oni povus precizigi per *san-paŭloŝtatano*, *san-paŭlourbano* kaj *san-paŭloteamano*. Simile okazus

por Rio-de-Ĵanejro.

Rilate la vorton Amazonas, mi proponas por la ŝtato la nomon *Amazono*. Por la rivero mi uzus ankaŭ la vorton *Amazono*. Tamen por la regiono nomata portugale Amazônia, kiu ampleksas aliajn landojn de Sud-Ameriko, la ĝusta nomo estas *Amazonio*. Sekve la nomo de la Asocio, kiu akceptis la ĉi-jaran Brazilan Kongreson de Esperanto devus esti *Amazona Esperanto-Asocio* kaj ne *Amazonia*, ĉar ĝi estas asocio de la ŝtato Amazono kaj ne de la regiono Amazonio, kiu eĥas aliajn ŝtatojn kaj eĥ aliajn najbarajn regnojn. Krome ni ne forgesu, ke ankaŭ Kolombio kaj Venezuelo havas respektive departementon kaj ŝtaton, kiuj nomiĝas Amazonas.

Ĉu Brazilo havas ŝtatojn aŭ subŝtatojn? – Lastatempe oni pli ofte uzas la vorton *subŝtato* por la federaciaj unuoj de Brazilo, cetere nomataj en la Konstitucio *estados* kaj ne *subestados*. Kvankam en kelkaj okazoj tiu distingo povus esti oportuna mi preferas uzi la vorton *ŝtato* aŭ, se necese, la esprimojn *federacia unuo* aŭ *federacia ŝtato*. Ne estas tasko de Esperanto ripari la mondon. Se oni volas ŝanĝi tion, oni ŝanĝu unue la konstitucion de la lando, por ke ĝi uzu la vorton *subestado*, tiam oni povos uzi senprobleme en Esperanto la vorton *subŝtato*.

Kiam, kie kaj kiel uzi la esperantigitajn nomojn? – Kompreneble oni uzu la esperantigitajn nomojn en esperantligva teksto direktita al alilandaj esperantistoj. Se vi skribos leteron per ordinara poŝto aŭ informas vian adreson en iu formularo (ekzemple por aboni revuon, mendi librojn ktp) vi devas uzi la nacilingvajn formojn, ĉar la mondo ankoraŭ ne scias pri la ekzisto de la Esperantaj nomoj. Tamen kiam vi verkas teskston en Espe-

ranto estas konsilinde ke en la unua apero de la nomo vi uzu la Esperantan nomon tuj sekvtan de interkrampa informo de la nacilingva formo, por ke la leganto povu trovi la urbon en sia nacilingva mapo aŭ per konsultito en interreto.

Mi esperas, ke oni vaste diskutu pri la temo por veni al fina konsento kaj adopti oficiale la urbo- kaj ŝtatonomojn proponitaj.

Raporto 15-a Renkontiĝo de Esperanto-grupo L.L.Z.

Nia renkontiĝo ankaŭ enhavis la humuran parton. Dirce Sales kaj Tania Paixão ludis skeĉon pri konfuziĝo inter portugaliaj kaj esperantaj similaj vortoj. Sekve, nia grupo ankaŭ ludis skeĉon, sed ĉi-foje pri radikala esperantisto, kiu laboras kiel akceptanto de kurso de la angla lingvo sed provas konvinki la personojn studi Esperanton. En tiu skeĉon estis 5 anoj de nia grupo (mi, Rosangela Oliveira, José Carlos Araújo, Margareth Gomes kaj Benedito Pereira) krom la fundamenta apogo de Sédio Rezende, Tania Mattos, José Mário kaj aliaj tri gravaj anoj de nia esperanto-grupo. Neniu el ni estas aktoro, sed Esperanto inspiras nin al grandaj defioj.

La lastan parton de nia evento ni aŭdis kaj kantis bonajn muzikojn. La bonega kantisto kaj komponisto Ale-

xandre Sankor, reĝisorita de sia aminda kaj simpatia edzino, Ana Márcia Cardozo, kantis la kanzonojn *La Pac'* (de Gilberto Gil), en la portugala lingvo kaj en Esperanto, *Um Amigo* (nur portugale) kaj *Esperanto*, omaĝo, kiun Alexandre faris al la lingvo de la frateco. La geedzoj, elkoraj esperantistoj, regalis nin per unu el la plej altkvalitaj momentoj de nia renkontiĝo.

Krom ĉiuj belegaj momentoj, estis fotosesio, bongustaj kaj variaj manĝaĵoj kaj lotumado de libroj, ĉemizoj, dvd-oj ktp. Ni fakte spertis belegajn kaj neforgeseblajn momentojn en tiu 11-a de septembro, en la *15-a Esperanta Renkontiĝo de Esperanto-grupo Lázaro Luiz Zamenhof*. Ni gratulas kaj dankas al ĉiuj partoprenintoj kaj kunlaborintoj!



Propedeŭtika Esperanto. Jes, ni kredas!

**Oportunaj varoj por via bretaro
atendas vin en nia
libroservo!**



Renkonto de Esperantistoj

en la **Paraíba Valo**



Paraíba do Sul/RJ
20-a de novembro 2016
de la 9h ĝis la 16h30

Temo: Ĉu ni disvastigas bone Esperanton?

Loko: E.M. Professor Manoel Gonçalves d' Ascensão
Rua Benjamim Constant, 139 - Centro

Com curso de esperanto gratuito para visitantes!

La Novjara Aranĝo de BEJO

8-a NOVA

Novjara Aranĝo

TORRES-RS

28/dec - 01/jan

Informoj ĉe:

www.facebook.com/novjaraarangxo